Heinrich Heine,

# Mi sonĝis

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

En sonĝo princinon vidis mi
Kun vangoj malsekaj de ploro, -
Sub arbo, sub verda jen sidis ni,
Tenante nin koro ĉe koro.

"De via patro la reĝa kron',
Por mi ĝi ne estas havinda!
For, for la sceptro kaj ankaŭ la tron' -
Vin mem mi deziras, aminda!"

- "Ne eblas tio!" respondis ŝi:
"En tombo mi estas tenata,
Ja nur en la nokto venas mi
Al vi, mia sole amata!"

*Traduko de la Germana poemo "Mir träumte" de* HEINRICH HEINE *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* MANFREDO RATISLAVO *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04).*

*Arg-526-1042 (2010-03-12 15:40:27)*

*Mi, Manfred Retzlaff, permesis al mi ŝanĝi kelkajn liniojn de tiu Esperantigo, kiun verkis Ludoviko Zamenhofo; ĉar en la origina versio de Zamenhofo la finaj vortoj de la unuaj kaj triaj linioj estas dusilaboj, dum en la origina versio de H. Heine tiuj estas uunsilabaj, tiel ke la akcento estas sur la lasta silabo de tiuj linioj. Krome, en du linioj mankas en la Zamenhofa origina versio kvara akcentita silabo. Tion mi provis "plibonigi". (Mi supozas, ke s-ano Zamenhof pardonus tion al mi.)*

Heinrich Heine,

# En sonĝo

*tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof*

En sonĝo princinon mi vidis
Kun vangoj malsekaj de ploro, -
Sub arbo, sub verda ni sidis,
Tenante nin koro ĉe koro.

"De l' patro de l' via la krono
Por mi ĝi ne estas havinda!
For, for la sceptro kaj trono -
Vin mem mi deziras, aminda!"

- "Ne eble!" Ŝi al mi rediras:
"En tombo mi estas tenata,
Mi nur en la nokto eliras
Al vi, mia sole amata!"

*Traduko de la Germana poemo "Mir träumte" de* HEINRICH HEINE *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF *(Ludoviko Lazaro Zamenhofo, ∗1859-12-15 – †1917-04-14).*

*Arg-526-1041 (2010-03-12 14:30:28)*

*La origina teksto verkita de Heinrich Heine troviĝas en la poem-volumo "Libro de l' kantoj" (Buch der Lieder), parto "Lirika Intermezo" (Lyrisches Intermezzo). Anstataŭ la unua linio de la dua strofo de la traduko de L. Zamenhof mi, Manfred Retzlaff, proponas jenon: "De via patro la reĝa krono".*